

Leterkesto, 6-a parto
Citaĵoj el la letero de Harri Laine
Claude Gacond, 301-a radioprelego, 1969.07.16 & 19

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

En nia leterkesto restas tri interesaj mesaĝoj de sinjoro Harri Laine en Nupuri, Finnlando. Ĉar ili koncernas la temon geografia nomenklaturado, kiun ni pritraktis dum dekduo da elsendoj, ni ilin konservis por konkludi nian kelksemajnan amikan babiladon.

A.- Sinjoro Harri Laine kelkfoje senpacienciĝis pro nia emo longe citi Gaston Waringhien. Aŭdu:

Cl.- « *Iom enuige aŭskulti sinjoron Gacond nur citadi el Waringhien* »,

A.- li skribis la 5-an de aprilo.

Cl.- Ni volis detalege pritrakti nian temon, kaj ni pensas, ke la eseo de Waringhien estas epokfara. Ni scias, ke la plimulto de niaj geaŭdantoj ne legis kaj verŝajne neniam legos la verkon *Lingvo kaj Vivo*. Nia rolo do estis, ne nur resume raporti pri la asertoj de Waringhien, sed ilin legi, kiel oni farus en kurso pri la temo geografia nomenklaturado.

A.- Ni konsideras, ke nia rolo de radio-kronikisto estas nur ĉefe pedagogia. La grandega plimulto de la esperantistoj lernis sian duan lingvon ekster la lerneja sistemo. Se vi volas, ni estas popolo de aŭtodidaktaj. Niaj radio-elsendoj estu por tiu publiko speco de supera lernejo, kie ili povas ricevi informojn, kiujn sen tio ili neniam ricevus.

Cl.- Sed kulture nia publiko estas ege varia. Leteroj pruvas, ke nin regule aŭskultas komencantoj, kiuj nenion konas pri la historio kaj pri la problemoj propraj al la lingvo internacia, simplaj esperantistoj, kiuj flue parolas sed malmulte legis, lertegaj esperantistoj, kiuj posedas grandan libraron kaj tute majstras la lingvon, kaj fakuloj, kiuj estus kapablaj multon instrui al ni.

A.- Por la fakuloj, tute certe, nia instru-ritmo estas tro lanta. Sed, se ni rapidigus ĝin, tiam la plej granda parto de nia publiko nenion plu komprenus. Kion fari? Ĉiu bona pedagogo dirus: iri malrapide kun la malrapidemaj elementoj. Tiel ĉiuj povas progresi, eĉ se la plej lertaj malpacienciĝas. Ĉu tio ne rememorigas la instru-problemon en ĉiu kurso pri esperanto, kiu uzas kolektivajn metodojn?

Cl.- Do, sinjoro Harri Laine, ni bonege komprenas viajn reagojn, kiam vi skribas:

A.- « *La prelegoj de gesinjoroj Gacond antaŭeniras, nu, kion mi diru? – tre originale. Mi jam ne kuraĝas eĉ imageri, al kio vi nin kondukos. Permesu etan rimarkigon: vi povus duoble pli rapide progresi, se vi kontentiĝus je du tri ekzemploj pri ĉiu klarigenda punkto.* »

Cl.- Se ni kontentiĝus pri tio, ni tute certe ne kontentigus la plimulton de niaj geaŭdantoj, kiuj havas la impreson, ke ni tro rapidas.

A.- En sia unua mesaĝo, kiu sekvis nian unuan prelegon pri la geografia nomenklaturado, sinjoro Harri Laine esprimas vidpunktojn, kiuj preskaŭ ĉiam estas la niaj. Kiel ni, li ne nur dubas pri la valoro de la proponita *Mondmapo*, sed eĉ pensas, ke ĝi povas esti danĝera por esperanto. Krom laŭdoj, en la gazetoj, ni ne trovas multajn kritikajn vidpunktojn. Aŭdu nian finnan aŭdanton:

Cl.- « *Kiam mi aŭdis, ke sinjoro Gacond intencas pritrakti la **Mondmapon**, mi streĉis la orelojn por pli klare aŭdi lin, ĉar mi mem havas sufiĉe fortan opinion pri tiu publikaĵo. Mi trovas ĝian valoron nula, eble eĉ ete negativa, kaj mi jam estis leginta en iuj esperantaj gazetoj laŭdajn vortojn pri ĉi tiu « nova grava atingajo » de nia **verda lingvo**.* » (Fino de la citaĵo.)

Leterkesto, 6-a parto
Citaĵoj el la letero de Harri Laine
Claude Gacond, 301-a radioprelego, 1969.07.16 & 19

A.- Kio nin ĉiam impresas, estas la manko de kritikema sinteno rilate al la novaj aperaĵoj. Verŝajne la kaŭzo troviĝas en nia malforteco kaj eteco. En Esperantio ĉiuj sin iomete konas, ni nin eĉ nomas samideanoj, kaj ni havas la impreson, ke kritikoj venas rompi tiun amikecon.

Cl.- Sed veraj amikoj kuraĝas sin kritiki. Mi havas multe da admiro por la laboro de sinjoro Tibor Sekelj, kaj morgaŭ mi lin ricevos en mia hejmo por kelktaga gastigo. Mi estas certa, ke li ne komprenos miajn kritikojn, kiel malamikecon al li, sed kiel deziron kunlabori al la starigo de vere akceptebla geografia nomenklaturaro.

A.- Sinjoro Harri Laine prave diras:

Cl.- « *La Komisiono, laŭ sia propra deklaro, klopodis sekvi kvin principojn, el kiuj neniuj ŝajnas senkondiĉe aprobebla. La ideo « esperantigi » ĉiujn nomojn estas ege aplomba kaj kontraŭas ĉiujn internaciajn principojn. Ne longe antaŭ la apero de la **Mondmapo** kunvenis en Genevo iom pli aŭtoritata komitato por ordigi la geografiajn nomojn, kaj tie la akceptita principo estis ĉie oficialigi por internacia uzo la formon uzatan en la koncerna lando (kio jam estas sufiĉe ne-unusenca difino). Do ekzemple por Ĝenevo akcepti la formon Genève. Esperantistoj volantaj esperantigi ĉiujn geografiajn nomojn montras ekstreman nekomprenon pri sia propra pozicio en la mondo kaj pri la signifo de la nocio **nomo** (propra nomo, por diri pli precize). Mi ne malaprobas ĉiujn esperantigojn, kelkaj el ili estas oportunaj kaj pravigitaj de **praktika uzado**. »*

A.- Jen diroj, kiuj ŝajnas al ni tute pravaj, kaj konformaj al la objektiva realeco. Sinjoro Harri Laine daŭrigas :

Cl.- « *Krom la fiksideo de esperantigo la Komisiono ŝajne havis ankaŭ la altan aspiron al **perfekta unusenceco** de la nomoj (« por ĉiu aparta objekto unu kaj nur unu aparta nomo, ne konfuzebla kun alia vorto »). Tia principo jam kaŭzis sufiĉe da malutilaj disputoj. [...] Eviti dubsencaĵojn estas bone, sed oni memoru, ke vortoj ĉiam aperas en la ĉirkaŭaĵo (kiel frazero, sur nomŝildo, sur mapo...), kio plej ofte unusencigas eĉ tute nekonatan vorton, por ne paroli pri du- aŭ tri-sencaĵoj. Ŝajnas do iom vane sin ĝeni per eltrovo de strangaj kripligoj pro igi iun nomon absolute unika. »*

A.- Sinjoro Harri Laine faris poste atentegan analizon pri tiu mondmapo, kaj ni lin dankegas. Ni tute uzos tiun analizon, kiu kompletigas la nian, por la daŭrigo de nia studo pri la problemoj de la geografia nomenklaturaro. Liaj konkludoj konformas kun la niaj :

Cl.- « *Mi esperas, ke oni ne daŭrigos ĉi tian esperantigon de la tuta mondo, almenaŭ ne per publikigo de pliaj mapoj. Mi atendas bonan mondmapon kun esperantaj klarigoj, sed nacilingva nomaro (krom landnomoj, kiuj estu esperantaj, same kiel kelkaj naturnomoj precipe en Antarkto kaj similaj lokoj, tamen ne tro esperantaj). Min povas interesi ekkoni iun mondmapon, sed min nemulte interesas, kiel iu esperantista komitato volas nomi la tieajn lokojn. Cetere la movado jam sufiĉe suferis kaj suferas de diversaj vortaristoj, terminaristoj kaj akademioj, kiuj kredas, ke ilia laboro, pro dia favoro, konsistas en apriora leĝdonado. Pli da naturscienca esplorado, mi deziras. »*

A.- Ni tute akceptas tiun konkludon. Kiel ni jam diris, tiu mondmapo devus posedi la nomenklaturon en du manieroj. Unue ni trovas en la naciaj skriboj, do per ĉiuj eblaj alfabetoj kaj ideogramsistemoj, la bazan nomenklaturon, kiun ĉiu mezkulturita homo konas. Poste, sub tiuj plej ofte nelegeblaj nomoj, ni trovas fonetikan transskribon, kiu konsiderus la nomon kiel radikon. Ni tiel ricevos geografian radikaron.

Leterkesto, 6-a parto
Citaĵoj el la letero de Harri Laine
Claude Gacond, 301-a radioprelego, 1969.07.16 & 19

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis
reaŭdo !

-oOo-